

Enskribo

pri la unua komitata kunveno okazinta la 31an de januaro 1956 en la klubejo en hotelo Slovan. Komenco je la 22.15 horo. Ĉeestis s-anoj: Vondroušek, prof. Scheiber, Adamcová, Zitová, Inĝ. Dro Šikula, Borkovec, Kořínek.

Post malfermo s-ano Vondroušek invitas s-anon Kořínek tralegi la preparitan sekretarian raporton por la jarkunveno. Post tralego fare de s-ano Kořínek la raporto estis aprobata kun 3 etaj kompletigoj. S-ano Borkovec ne prezentas kasistan raporton, ĉar la kaso estas administrata de la Kleriga Kunularo. La stato ĉe la jarfino estis laŭdeve nula. S-ano Vondroušek donas komunikon pri la komitata kunveno en Osvětová beseda, kiun partoprenis li kaj s-ano Kořínek. Oni parolis detalojn pri iuj punktoj de niaj programoj. Ŝajnas, ke la sinteno de la Urba Kleriga Kunularo favoriĝis al ni. S-anino Zitová sciigas, ke la biblioteko estas en stato de reorganizo; multaj ankaŭ ne redonis la depone prenitajn librojn. Nemultaj en la pasinta jaro prunteprenis libron.

Fine estis kunmetita la proponode la kandidat-listo por la ĝenerala kunveno venontan mardon.

Finite je la 23a h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la Ĝenerala kunveno kaj la komitata kunveno okazintaj la 7an de februaro 1956. Post tralego de sekretaria raporto fare de s-ano Kořínek kaj kasista raporto fare de s-ano Borkovec kaj aprobo de ambaŭ raportoj kaj demisio de la malnova komitato transprenis la gvidon de la kunveno s-ano dir. Solčany. La elekta komitato konsistanta el s-anino Konečná, s-ano Kaláb kaj s-ano Solčany prezentis novan kandidatliston. Unuanime estis reelektita prezidanto s-ano Vondroušek, kiu dankante transprenas la prezidon. Poste estis ĉiesvoĉe elektita en tuto la komitato. Elektitaj estis s-anoj: Josef Friedrich, Marie Adamcová, Tomáš Borkovec, prof. Vilibald Scheiber, Inĝ. Dro Jaromír Šikula, Jiří Kořínek, Jan Werner, Josef Cink, Frant. Fajtková. La kunvenon ĉeestisa 36 gesamideanoj, inter ili la gvidantino de Urba Kleriga Kunularo s-ino Srchová kaj la intendanto s-ro Trijdrich, kiuj salutis nian rondeton. Poste okazis la unua komitata kunveno en kiu estis al la novelektitoj jen distribuitaj funkcioj: Josef Friedrich vicprezidanto, Jiří Kořínek I. sekretario, Marie Adamcová II. sekretario, Tomáš Borkovec kasisto, prof. Vil. Scheiber artaj aferoj, Jan Werner k Josef Cink junularaj aferoj, Frant. Fajtková bibliotekistino, Inĝ. Dro Jaromír Šikula komitatano. S-anoj M Němec kaj Sáva Střelec restas revizoroj.

S-ano J. Friedrich transdonis librojn, kiujn li ricevis el postlasaĵo de dir. Fridrich en Kr. Pole. Pluajn librojn li ankoraŭ esperas ricevi.

Fino je la 23a.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la 2a komitata kunveno okazinta la 29a-n de aŭgusto 1956 en kafejo Slavia je la 19.40 horo. Ĉeestis s-anoj: Vondroušek, Borkovec, Dro Šikula, prof. Scheiber kaj Kořínek. S-ano Kořínek legas la lastan enskribon. Poste s-ano Vondroušek pritraktas la programon por la sekvanta jartriono. Oni preparolis eblecon inviti s-anon Kožený por prelego, kaze, ke li estos dum aŭtuno en Brno, por ke la prelego ne kaŭzu elspezojn por la kluba kaso. S-ano Vondroušek raportas pri siaj antaŭagoj por la planata Esperanto-ekspozicio en Brno. Li invitis s-anon Ambrož por helpi nin tiurilate. S-ano dro Šikula promesas demandi pri ebleco de ekspozicio en la Industria Muzeo en Husova strato. S-ano Vondroušek diras, ke li intencas afiŝi la aŭtunajn Esp. kursojn, kion la komitatanoj aprobas. Li ankaŭ mendis 50 afiŝojn de la Olomouca Konferenco, kiujn ni afiŝus. Finita je la 21.25 h.

Enskribis Jiří Kořínek